Motivation - Education - Trust - Environment - Safety 2020
METES
Recenzovaný zborník z V. medzinárodnej vedeckej konferencie, 21.II.2020, Ružomberok
**Proceedings of the 5th International Conference**, Ružomberok, February 21,2020
Bratislava: SSŽP et Strix. Edition ESE-54, ISBN 978-80-973460-7-2

# KONFERENCO METES-2020 EN LA KUNDEKSTO DE NUNTEMPAJ SOCIAJ KAJ VIVMEDIAJ PROBLEMOJ

**Stano MARČEK**

METES
Motivation - Education - Trust - Environment - Safety 2020

**ANTAŬPAROLO**

La daŭripova disvolviĝo de la socio prezentas grandan defion por la hodiaŭa civilizo. Ĝi prezentas ŝancon krei pli homan socion, pli justan ekonomion kaj pli civilizitan civilizon. La homaro nun havas la ŝancon krei kondiĉojn por la socio, funkcianta laŭ la principoj de kunlaboro, kreemo, justeco, participado kaj humanismo. Tial oni ĉiam pli intense serĉas vojojn por redirekti nunajn homajn agadojn direkte al forlaso de la modelo de industria disvolviĝo de la socio kaj transiro al la modelo daŭripova. Ĝi baziĝas sur la fakto, ke la nuna industria modelo elĉerpis siajn evoluajn eblojn kaj la fino de la 20-a kaj la komenco de la 21-a jarcentoj estas markita de la serĉado de funkcianta alternativo al la industria modelo de la disvolviĝo. Montriĝas kvanto da alternativaj ekonomiaj kaj sociaj teorioj pri la ekonomia kaj socia disvolviĝoj, celantaj redirekti la socion kaj la civilizon al la daŭripova modelo de la disvolviĝo. La nova paradigmo de disvolviĝo iom post iom akiras pli kaj pli konkretajn konturojn, kaj jam hodiaŭ eblas identifigi la bazajn karakterizaĵojn de la ebla estonta modelo de la daŭripova disvolviĝo.

Por ke la disvolviĝo havu longtempan pozitivan efekton, ĝi devas esti daŭripova. Daŭripova evoluo parolas pri la strebo certigi, ke la teraj fontoj, kiujn ni uzas por ekonomia kresko, estu disponeblaj ankaŭ por la estontaj generacioj. La aktuala atento, kiu estas nuntempe dediĉata al la minacoj de tutmondaj klimataj ŝanĝoj, estas ekzemplo kiel la homa libereco kaj la homa disvolviĝo povas esti ĝenataj, kiam la interesoj de la ekonomia kresko kaj disvolviĝo estas apartigitaj de la interesoj de la vivmedio. La solvo de nuntempaj mediprotektaj problemoj estas ne nur demando pri la teknika solvo, kiu ĝis antaŭ nelonge ekfunkciis aŭ en reago al la ekestinta vivmedia problemo, aŭ kadre de pli progresema aliro ol preventa aliro. Ĝi devus esti ŝanĝo en la valora orientiĝo de la homo, kiel individuo, sed ankaŭ de la socio kaj de la tuta homaro.

La koncepto pri daŭripova evoluo parolas pri maniero de ekonomia kresko, kiu kovras la bezonojn de la socio per kreado de kondiĉoj por bonfarto, en mallongdaŭra, mezdaŭra, sed precipe longtempa horizonto. La koncepto baziĝas sur la supozo, ke la disvolviĝo devas plenumi hodiaŭajn bezonojn, sen endanĝerigi la potencialon por daŭra kresko por la estontaj generacioj (ekzemple elĉerpo de nerenovigeblaj fontoj sen trovi alternativojn, detruo de ekosistemoj, necesaj por la vivo, ekigante ŝanĝojn en naturaj kondiĉoj, kiuj grave komplikigas eblecojn de la homa pluvivado kiel la biologia specio, ktp.).

Signifo de la vivmediaj kaj sekurecaj problemoj nuntempe daŭre kreskas. Krom influo de la homa agado al la vivmedio ni ĉiam pli priatentas ne nur kvaliton de la vivo, sed ankaŭ la kulturan kaj la socian mediojn.

La komplika problemaro kiel kombini kreskon de la materia bonfarto de la homoj kun defendado de la naturo enhavas kelkajn bazajn aspektojn:

- daŭre fortiĝanta influo de ekonomiaj aktivecoj al la vivmedio,
- ĉiam pli ni konscas limigitecon de la naturaj fontoj,
- limigiteco de la fontoj metas antaŭ ekonomian agadon la imagan limon de permesataj ŝarĝoj, trapaso de kiuj povas kaŭzi nedeziratajn senrevenajn ŝanĝojn en la ekvilibro kaj funkciado de la naturo,
- plialtiĝas la tasko defendi la vivmedion en ekonomia kaj sociala vivoj,
- plifortiĝas reciproka trapenetrado kaj kunfluado de manaĝeraj aliroj kaj metodoj, utiligataj en terenoj de kvalito, sekureco kaj defendado de vivmedio.

Problemaro de la vivmedia defendado nuntempe renkontiĝas kun pluaj gravaj problemoj, inter kiujn apartenas ekzemple:

- intensa disvolviĝo de la civilizo plialtigas pretendojn por konsumado de akvo, kiu estas nuntempe konsiderata unu el la plej altvaloraj naturfontoj,
- disvolviĝo de la akvokulturado en la urba regiono, aliro kaj kvalito de la akvo,
- precipe danke al la granda ekonomia premo de komercaj ĉenoj al konstruado de aĉetcentroj en periferiaj urbozonoj kaj konstruado de entreprenoj kaj loĝistikaj centroj „sur verda herbejo“ la urboj neadekvate diskreskis en la regionoj, kio koneksiĝas al pliaj problemoj, kiuj estas interalie densigo de la grundo (konstruplenigo kaj betonumado de la grundo), resp. ekesto de tiel nomataj brunaj kampoj (*brownfield*), t.e. urbaj teritorioj, kiuj ĉesis servi al la origina funkciado, por kiuj ili estis konstruitaj,
- bruo en la ekstera vivmedio, kreita de homaj agadoj, precipe de la surtera, fervoja kaj aviadila trafikoj kaj de la industria funkciado,
- komunumaj rubaĵoj, sed ankaŭ rubaĵoj, devenantaj el la produktaj agadoj, maniero de rubaĵprizorgado,
- reduktado de biologia diverseco ktp.

Defendado de la vivmedio kaj direktado al tia disvolviĝo de la socio, kiu ebligos pluan ekonomian progreson, altigon de la vivnivelo, kiu samtempe konservos la naturon kaj fontojn por sekvaj generacioj, postulas komprenon de la nuntempa stato. Ekkono de la kialoj, kiuj kaŭzas vivmediajn problemojn kaj eblecojn, kiel ilin preventi, resp. kiel forigi vivmediajn ŝarĝojn, povas kontribui al ŝanĝo de la aliro ne nur en la tereno de produktado, sed ankaŭ de la konsumado, eluzo de produktoj kaj post la fino de uzado ilia sekva sekundara eluzo, resp. sendanĝerigo. Rezulto de tia ekkono povus esti pli kvalita, vivmedie pli akceptebla aliro ĉe ĉerpado de fontoj, en produktado kaj konsumado, kiu tamen ne ekestus surbaze de ordonoj aŭ malpermesoj, sed sekve de la naturaj homaj konoj.

Sufiĉa publika vivmedia konscio en vivmediprotekta tereno estas la baza kaj la prioritata postulato de la sukcesa realigo de vivmediprotekta politiko en la praktiko. Altigo de la publika konscio pri problemaro de la defendado de la vivmedio kondukas la publikon ne nur al pli bona kompreno de la vivmediaj koneksoj inter la ekonomia kaj sociala vivoj de la socio, sed ankaŭ al altigo de kvalito de decidoj de la konsumantoj, al altigo de jura konscio de la civitanoj kaj sekve ankaŭ al altigo de la defendado de la vivmedio kaj kvalito de la vivo.

Celo organizi la 5-an Internacian Sciencan Konferencon "METES 2020" (Motivation - Education - Trust - Environment - Safety) estis informi la fakan kaj sciencan publikojn, reprezentantojn de la aŭtonomio kaj la ŝtata administracio, interŝanĝo de spertoj kaj prezentado de novaj rezultoj en problemaro de motivado, klerigado, fido, defendo de vivmedio kaj sekureco.

**CONTACT ADDRESS**

**Stano MARČEK**
Zvolenská 15/21, 036 01 Martin, Slovakio
Redaktoro de la revuoj *Juna Amiko* kaj *Esperanto aktuell*
Membro de Akademio de Esperanto
*Stano.marcek@gmail.com*